**Protokolo de la 40-a Ĝenerala Asembleo** de la Scienca Sektoro de AIS okazinta en Munkeno en EineWelt-Haus, Schwanthalerstraße 80, ĉambro 109.

Kunsidtempo: Dimanĉo, 2012-04-15, 14:15–16:00.

1. F*ormalaĵoj.* La kunveno okazas laŭ la kunsidregularo. La kunsidon gvidas laŭ peto de la ĉeestantoj OProf. Wickström; OProf. Fössmeier verkas la la protokolon. La kvorumeco ne estas dubata. La ĜA decidas trakti kvar aldonajn decidojn, kies enhavo evidentiĝas el punkto 5 de ĉi tiu protokolo.
2. Ĝ*enerala raporto.* .AIS planas SUS 33 en Varsovio inter la 26-a de aŭgusto kaj la 23-a de septembro, se ĝis fino de majo ĝi ricevos inviton de Warszawska Szkoła Zarządzania – Szkoła Wyższa. Je la 22-a de marto okazis kunsido de la san-marina AIS-asocio, la protokolo estis tribunale deponita. La jura adreso de la san-marina AIS-asocio nun estas ĉe Riccardo Venturini, Via La Morra 16, RSM 47893 Borgo Maggiore.
3. F*inanca raporto.* La trezoristo raportas, ke en 2007 estis modera perdo de 732 eŭroj. Poste la perdoj kreskis; en la kvar sekvaj jaroj AIS perdis ĉ. 16.000 eŭrojn. Pro malkreskanta intereso pri AIS ne okazis la planitaj enspezoj; pluraj membroj ne pagis sian kotizon. Granda parto de la aktivaĵoj de AIS, ĉ. 40.000 eŭroj, estis investita en la akademidomaro en Komárno kaj kredeble estas perdita, ĉar AIS ne ricevis ŝtatan licencon por instrui en Slovakio. La restanta kapitalo estas ĉ. 4.000 eŭroj.

   Kun la sekva numero de GrKG/H estos dissendita kotizfakturo por la subtenaj membroj.

   Kiel komisiite de la ĜA dum SUS 32 EProf. Konnerth kontrolis grandan parton de la spezoj ekde 2007 kaj ne konstatis neregulaĵojn. Revizoro ADoc. Macko konsentas kun tiu raporto. Laŭ propono de OProf. Maitzen la ĜA decidas, ke la komisio de EProf. Konnerth kontroli la librotenadon estas per tio plenumita. Surbaze de la raporto OProf. Maitzen proponas senŝarĝigon de la malnova senato. La propono estas akceptita sen kontraŭvoĉoj.
4. D*ecidoj pri proponoj de la senato.* Nenio decidenda.
5. K*romaj tagordaj punktoj.* La ĜA unuanime akceptas jenajn kvar proponojn faritajn dum tagordero 1:
   a) La ĜA rekomendas al la Subtena Sektoro subteni la omaĝlibron por OProf. Helmar Frank per tio, ke ĉiu dumviva subtena membro ricevas ekzempleron je la kostoj de la SubS. Aliaj subtenaj membroj havu la rajton mendi ekzempleron je duona prezo. Tiu subteno estu limigita al 1.500 eŭroj.
   b) La ĜA taskas al la senato, ĝis la fino de la jaro prezenti planon, kiel daŭrigi la agadon de AIS.
   c) Se SUS 33 ne povos okazi en 2012, la senato esploru, ĉu eblas okazigi preleg-sesion en San-Marino.
   d) Ĉar la agado de AIS nun ne estas tre vigla, la simbola kotizo de 6,50 eŭroj ĉi-jare ne estu deprenita de la servo-bonhavoj de la AIS-anoj.
6. E*lektoj.* Dr. Eugen Macko kaj Dr. Friedrich Josef Dörr estas elektitaj kiel revizoroj*,* Dr. Sara Konnerth kiel anstataŭanto..
7. *Diversaĵoj.* Ne estas aliaj temoj traktendaj.

Munkeno, 2012-04-15
*Bengt-Arne Wickström, kunsidestro*
*Reinhard Fössmeier, protokolanto*